**PILO-PRESS**

Internacia

Informservo

N-ro 14/78 - 5 aprilo 1978

Aperas ĉiusemajne

Ankoraŭ tempo estas!

Aliĝu tuj al la Germana Esperanto Kongreso 1978 en Augsburg!

Eldonanto/Herausgeber:
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69

## 56-a Germana Esperanto-Kongreso Augsburg 1976

Aŭgsburg (pp) - Ni denove invitas ĉiujn germanajn esperantistojn kaj eksterlandajn gastojn partopreni en la 56-Germana Esperanto-Kongreso pentekoste en Augsburg. Urĝas nun la aliĝo kaj mendo de ĉambroj kaj ekskursoj. Ni atentigas ke duontaga ekskurso anoncita en la aliĝilo ne okazos. La duontagan ekskurson anstataŭos la inaŭguro de Ludwig-Zamenhof-Strasse en Augsburg. La aliĝkotizo ekde la 1-a de aprilo estas 30,- GM.

Ĉi-sekve ni publikigas la provizoran kongresan programon:

Vendrede, 12.5.78

| | |
|---|---|
| 18,00 - 22,00 h | Ĝiĉeto malfermita |
| 20,00 h | Interkona vespero |

Sabate, 13.5.78

| | |
|---|---|
| 9,00 - 13,00 h | Ĝiĉeto malfermita |
| 10,30 h | Urba rondveturado |
| 12,30 h | Tagmanĝo |
| 15,00 h | Solena malfermo en la Urba Domo de Augsburg |
| 17,00 - 19,00 h | Ĝiĉeto malfermita |
| 17,00 - 18,00 h | Komuna kunsido de GEA-estraro kaj Konsilantaro |
| 17,oo - 18,00 h | Kunsido de Ludwig-Zamenhof-Gesellschaft e.V. |
| 18,00 h | Vespermanĝo |
| 20,00 h | Kongresa balo |

Dimanĉe, 14.5.78

| | |
|---|---|
| 9,00 h | Katolika Diservo |
| 10,00 - 11,00 h | Kunsido de TANEF |
| 10,30 - 11,30 h | Kunsido de Germana Esperanto-Instituto |
| 11,30 - 12,30 h | Kunsido de Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj |
| 11,30 - 12,30 h | Kunsido de Internacia E-Klubo Aŭtomobilista |
| 12,30 h | Tagmanĝo |
| 14,30 h | Jarĉefkunveno de GEA |
| 16,30 - 19,30 h | Ekzameno pri lingva kapableco |
| 16,30 - 17,30 h | Kunsido de KELI |
| 17,00 - 18,00 h | Estrarkunsido |
| 18,oo h | Vespermanĝo |
| 20,00 h | Amuza vespero |

Lunde, 15.5.78

| | |
|---|---|
| 9,00 h | Evangelia diservo |
| 10,00 - 12,00 h | Ĝenerala laborkunsido |
| 12,00 h | Tagmanĝo |
| 13,30 h | Ekveturo per busoj al la inaŭguro de Ludwig-Zamenhof-Strato en Augsburg |
| 14,oo h | Solena inaŭguro de la Zamenhof-Strato |
| 15,30 - 17,30 h | Jarĉefkunveno de Bavara Esperanto-Ligo |
| 18,00 h | Vespermanĝo |
| 19,30 h | Lumbildprelego "Augsburg einmal anders" |

Marde, 16.5.78 — 8,00 horo Ekveturo al la tuttaga ekskurso al Nördlingen (Ries) - Aalen

Rimarkoj pri la programo

Kadre de la germana kongreso ludos ankaŭ la Pola Esperanto-Teatro, kiu prezentos la teatraĵon "La Hipnoto". Por ĉiuj do estos bona okazo rigardi Esperanto-teatraĵon.

Ni ankaŭ atentigas je la Ekzameno pri lingva kapableco, dimanĉe, la 14.5.78 de 16,30 - 19,30 h. Sinanoncojn oni sendu al Gerald Tucker, Trettachstr. 34, 8900 Augsburg.

Ĉiuj aranĝoj okazos en Kolpingdomo Augsburg escepte de la Solena Inaŭguro, kiu havos lokon en digna salono de la Urba Domo.

En la kongresejo funkcios dum la kongresa daŭro ekspozicio kaj librostando.

Aliĝu tuj kaj venu amase al Augsburg. Kongresa adreso estas: Hermann Schmid, Alte Reichsstr. 31 f, D-8901 Steppach.

************************

Invito al bavaraj esperantistoj

Ausgburg (pp) - Konsiderante la fakton, ke pentekoste okazos la kongreso en Augsburg, la estraro de Bavara Esperanto-Ligo (BELO) decidis, ne okazigi jarĉefkunvenon la 8-an kaj 9-an de aprilo en Regensburg. La membroj de BELO certe havos komprenemon pri tio! Necesas kunvenigi ĉiujn esperantistojn pentekoste en Augsburg.

La estraro de BELO do invitas la membrojn al la jarĉefkunveno en Augsburg la 15.5.78 (lunde) de la 15,30 - 17,30 horo en Kolpinghaus. La Bulteno de BELO kun invito kaj tagordo ĝustatempe atingos la membrojn.

Kompreneble la membroj de BELO rajtas partopreni en la jarĉefkunveno de BELO sen aliĝo al la kongreso, tamen la LKK petas ankaŭ aliĝi al la kongreso kaj speciale partopreni en la Solena Inaŭguro de la Kongreso sabate, 13.5.78, je la 15-a horo en la Urba Domo.

ROMOLO invitas

Frankfurt/M (pp) - La 16-an de aprilo 1978, je la 10-a horo, okazos en Frankfurt, Nordweststadt, Bürgerhaus im Nordwest-Zentrum, Nidaforum 2, Klubejo 1 la printempa renkontiĝo de Esperanto-Ligo Rhein-Main.

Ludos la Pola Esperanto-Teatro la teatraĵon "La Hipnoto", kiu en Frankfurt komencos sian turneon tra Federacia Respubliko Germanujo. En la ROMOLO-invito ni legas: "Venu multnombre. La pola artista duopo estas konata en Esperantujo. Valoras de malproksime alveni!"

****************

Reagoj, opinioj

Al la redakcio kaj la legantoj de Pilo-Press ni sendas sincerajn paskajn salutojn el la varma sudo de Francujo.

R. Haupenthal + familio

Okaze de la komenciĝinta printempo kaj Pasko-Festoj mi sendas al vi kaj al ĉiuj legantoj de "Pilo-Press" tutkorajn salutojn. Ke printempo ankaŭ venu en la E-movadon! Ĉiam kun intereso mi sekvas la unuopajn numerojn de PP kaj vian EER, kiu pro la varia enhavo eble eĉ devus ricevi pli da atento flanke de la internacia e-ista publiko......

Kun sinceraj salutoj A. Pettyn/1978-03-21 (Pollando)

******************

Se vi opinias, ke la agado de PILO meritas vian subtenon, tiam mi invitas vin legi kaj aboni Pilo-Press (PP) kaj Eŭropan Esperanto-Revuon (EER). Jara abonkotizo por PP 30,- GM kaj por EER 16,- GM. Volonte ni ankaŭ akceptas mondonacojn, kiujn ni uzas por legantoj en ne-pagipovaj landoj. Ludwig Pickel, Postfach 2113, D-8500 Nürnberg 1, Pĉk. Nürnberg 819 56-851.

Por pli batalema sinteno

Parizo (pp) - La Internacia Gazetarservo de SAT-Amikaro informas:

"Kvankam celanta ĉefe la pristudon de la problemoj pri disvastigo de Esperanto en france parolantaj landoj, la 33-a kongreso de SAT-Amikaro (Laborista Esperanto-Asocio, 67, avenue Gambetta, F-75020 Paris) kunigis en Rennes 132 partoprenantojn.

Poŝtkarto kun prezento en bretona lingvo kaj Esperanto estis eldonita tiuokaze; ĝi estas la frukto de kunigitaj klopodoj de la organiza kongres-komitato kaj de la kultura organizo "Brezhoneg Yezh Vew". Lernolibro por Esperanto en la bretona estis eldonita de "Hor Yezh". La sukceso de tiu iniciato povus konduki poste al dulingvaj eldonaĵoj etna lingvo/Esperanto, kaj favori pli bonan konon kaj pli grandan komprenon de la respektivaj ideoj.

La kongreso pristudis konkretajn decidojn por akceli la disvastigon de la Internacia Lingvo ĉe la fizikaj kaj intelektaj laboristoj, kun aparta atento pri la laboristaj sindikatoj.

La strebo al informado, kiu montriĝis pozitiva dum la periodo 1977/78, estos forte pligrandigita; ankaŭ per la konstatoj rezultantaj el la kuraĝigaj rezultatoj estos ellaboritaj novaj rimedoj por la memlernado de Esperanto. La pli kaj pli grava kaj aktiva partopreno de gejunuloj cetere montras, ke la ideo pri internacia lingvo renkontas pli kaj pli favoran akcepton ĉe la junularo, kiam ĝi havas la eblecon sin dokumenti kaj studi tiun lingvon.

La debatoj de la kongreso rezultigis la unuanime akceptitajn ĉi sekvajn rezoluciojn:

1 - La kongreso, emociigita de la katastrofo, kiu trafis la bretonan marbordon, asertas, ke tiu agreso kontraŭ la naturo, kiu trafas nun Bretonion, estas daŭra danĝero por la homaro,
- firme kondamnas la respondeculojn, kiuj devis eviti tiun katastrofon,
- esprimas profundan simpation al ĉiuj, kiuj unuiĝas por provi limigi la multajn kaj terurajn konsekvencojn de tiu ĉi plago.

2 - La kongreso alvokas la laboristajn esperantistojn al partopreno en la kampanjo kontraŭ fabrikado, vendo kaj ŝakrado de armiloj ĉiuspecaj, kampanjo lanĉita okaze de la venonta sesio de U.N. pri malarmado.

3 - La kongreso subtenas la leĝproponon n-ro 1667, kiu celas enkondukon de la Internacia Lingvo Esperanto kiel fakultativa lingvo en la duagradan instruadon,
- konstatas, sekve de multaj kontaktoj kun reprezentantoj de organizoj por la pluvivo de la bretona lingvo kaj kulturo, ke la uzo de la lingvo Esperanto devas, en ĉiuj kazoj, kontribui al la disvolvo de la etnaj lingvoj kaj kulturoj.

******************

Sekve de la Semajno de Internacia Amikeco

Triesto (pp) - Februare, okaze de la Semajno de la Internacia Amikeco, la Triesta Esperanto Asocio prezentis, en publika kafejo, artan programon. La aranĝo rezultigis gravajn atingojn ĉar inter la multenombra publiko estis ankaŭ reprezentantoj de loka radio "Nord-Est". Sekve de la favora impreso, tiu radio organizis, la 17-an de marto, interesvekan radio-debaton pri la monda lingvo-problemo. Krome, radio "Nord-Est" disaŭdigos, ĉiumerkrede de la 19-a ĝis la 19,30, Esperanto-kurson.

Citaĵo el Leterkesto de ORF-Wien 1978-03-25/26

"Eŭropa Esperanto-Revuo" numero 1 prezentas la trian parton de la elstara artikolo "La pozicio de Esperanto en Radiofonio", vere historia dokumento, en kiu Antonio De Salvo sagace penetras la kaŭzojn kaj interrilatojn de la koncernaj problemoj. La sama numero entenas ankaŭ du represojn el niaj programoj. Aliajn ni trovas en "Pilo-Press",numero 12.

Citaĵo el Esperanto-Ekspreso de Pola Radio de la 2.4.78 6,00 h

Pola Radio, en la rubriko "El la Esperanta gazetaro", priparolis la martan numeron de la revuo "Esperanto", numeron 1 de Eŭropa Esperanto-Revuo kaj la novan - kun prokrasto de unu jaro aperintan - numeron de Pola Esperantisto.

Pri Eŭropa Esperanto-Revuo Barbara Pietzrak diris i.a.: "Kompreneble la rubriko 'Esperanto en Radio' en Eŭropa Esperanto-Revuo estas multe pli ampleksa kaj pritraktas diversajn problemojn de la eŭropaj radiostacioj utiligantaj la Internacian Lingvon. Kadre de la sama rubriko estis aperigita la tria kaj samtempe lasta parto de artikolo de Antonio De Salvo 'La pozicio de Esperanto en la radiofonio'. Kompreneble en siaj elvolvaĵoj s-ano Antonio De Salvo prezentas la problemon el la vidpunkto de rekte amatoreca laboro, fare de Esperanto en radiofonio. Kiel ni jam kelkfoje substrekis ne kun ĉiuj opinioj oni povas konsenti konsiderante la saman laboron en profesiaj kondiĉoj."

Esperanto en Radio - Recenzo de aŭskultanto

D-ro J. Kondor skribas pri la elsendoj en Esperanto:

Portugala Radio jam trian fojon respondis al mi letere, ili estas vere ĝentilaj! Lastan fojon mi kaptis ĝin antaŭ la 21,30 h kaj 22 h, sufiĉe klare, bone, sur la 49 m-ondolongo! Mi esperas, ke baldaŭ ili disaŭdigos programon pri Fatima, kie laboras mia parenco P. Luin Kondor, sekretario de la episkopo.
Ĉe Radio Vatikana mi miras, ke la lasta leterkesto elfalis. (Noto de Pilo-Press: Laŭ informo dum la elsendo la leterkesto nun okazos ĉiam la lastan dimanĉon de la monato, ne plu meze de la monato!) Paske mankis la voĉo de P. Biedulski.
Pekinon mi povas kapti, sed neĝueble.
IBRA estas ĉiam ege subpremata de aliaj flankaj stacioj, sekve neuzebla.
Zagrebon eble mi provos marde (4.4.) aŭskulti, je la 23,45 h.
Radio Roma estas denove ege malbone aŭ tute ne kaptebla.
ORF estas bonege kaptebla en la lasta tempo, ankaŭ matene! Lastan fojon (25/26.3.) ORF ĝentile menciis mian 4-paĝan artikolon en Nihil Novi.
Ĉe Pola Radio mi tre bedaŭras, ke via ŝatata programero (PP) lastatempe mankas aŭ nur sporade io aperas. Entute mi havas la impreson, ke Pola Radio /reduktas la Esperanto-teman programon kaj pli dominas la temo, koncernanta la landajn aferojn (kio estas komprenebla flanke de la ŝtato, sed multaj esperantistoj ne volas kompreni, ke ŝtata radio je la unua loko volas propagandi sian ekonomion, kulturon, historion kaj ne Esperanton!) Tamen mi pensas, ke en tiu ĉi vasta kaj riĉa skalo de la elsendoj Pola Radio povus aŭ devus trovi tempon ankaŭ por E-temaj programoj (kiel ĝis nun!)
Sed nun aŭskultu alian interesan, bonan informon: Paskolunde ni estis survoje en nia nova Audi-automobilo inter Darmstadt kaj Koblenz, sur la aŭtoŝoseo, kiam la urbon Limburg preterveturinte mi rimarkis, ke la horloĝo montras ĵus la 19-an. Mi petis mian edzinon apud mi (mi ŝoforis) tuj enŝalti la aŭtoradion "Ingolstadt (de Aŭdi!) por kapti Bernon. Kaj jen ni brile povis aŭdi (49 m) Bernon (Luzern - 800 jara) eĉ pli bone, ol hejme per la kofroradio! Sen ĝeno, klare!

Esperanto en Radio el Nürnberg

Zagrebo. Kompreneble ni aŭdis la lastan elsendon dum vendredo. Dankon pro la afabla mencio de Pilo-Press. Kun intereso ni atendas la unuan mardan elsendon kun radia humoraĵo!
Radio Vatikana. 332 korespondaĵoj alvenis de mezo februaro ĝis fino de marto ĉe la Esperanto-Redakcio de Radio Vatikana. Je la pinto denove staras F R Germanio.
Radio Vieno. La ĉi-semajna komentario sin okupis pri la aŭstraj UNO-fortoj en Libano kaj la Kreisky-vizito en Orienta Berlino.
Svisa Kurtonda Radio. S-ro Gacond daŭrigis citi el Svis Espero kaj d-ro A. Baur parolis pri trafiko sur fervojo. La svisoj ŝatas fervoje veturi. Ili okupas la duan lokon en la mondolisto!